# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre E-48005-
BILBAO (Hispanio)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es) esperantobi@gmail.com
TTT-ejo:

**Jar-kotizoj**: Normala: 20 €. Speciala: 15 €. Familia: 35 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**JANUARO/FEBRUARO 2010 (1/10)** **Nro. 81**




**ANKAŬ ESPERANTO SUR LA FAŜADO DE LA PROVINCA BIBLIOTEKO DE BIZKAJA**

La faŝado de la nova provinca biblioteko estas vitraĵo, kiu ĉirkaŭas modernan konstruaĵon. Tiu vitraĵo estas ornamata de fama frazo de poemo de Gabriel Aresti, loka fama poeto de la mezo de la 20-a jarcento. Kaj tiu frazo estis skribita en preskaŭ ĉiuj lingvoj de la Mondo. Inter ili, ankaŭ estas Esperanto.

"La domon de mia padro defendos ni kontraŭ la lupoj"; jen kiel tekstas la frazo, kiun vi povas legi meze de la ĉi-supra foto. Bedaŭrinde, ĝi enhavas etan eraron: "padro" anstataŭ "patro".

La konstruaĵo troviĝas en la strato "*Arbieto*", post la palaco, kiu estas la sidejo de la provinca estraro, tre proksime de la "Ĉefstrato" ("*Gran Vía*") de Bilbao.

# LOKE ...

## ZAMENHOFA FESTOTAGO.



*Nia prezidanto, José Luis Bringas, alparolas la ĉeestantojn kaj kuraĝigas la novajn gelernantojn por ke ili daŭrigu la laboron de siaj antaŭuloj en la E-Grupo de Bilbao.*

Kiel anoncite, la sabaton 19-an de decembro, ni renkontiĝis en nia E-Grupejo por celebri la 150-an datrevenon de la iniciatoro de Esperanto. Ĉirkaŭ 30 homoj aŭskultis mallongan prelegon de nia prezidanto, José Luis Bringas, kaj longe interparolis ĉirkaŭ tablo plenplena de la frandaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj. La etoso estis vere agrabla kaj optimisma danke al la granda nombro de gejunuloj kaj eĉ infanoj, kiuj gajigis nin per ridoj kaj senĉesaj ludoj.

## DAŬRIGAS LA NOVA KURSO DE ESPERANTO.

Plensukcese daŭrigas la nova kurso de Esperanto, kiu komencis la pasintan 9-an de oktobro en nia sidejo. Al la 4 novaj gelernantoj aldoniĝis 3 malnovaj membroj de la E-Grupo. La etoso estas vere agrabla kaj la kurso estas malfermita al kiu ajn homo, kiu dezirus perfektigi siajn lingvokonojn. Klasoj okazas ĉiuvendrede, inter la 19,30 kaj la 21,00 h.

## INTERVJUO EN "RADIO EUSKADI".

La 18-an de decembro, Jesús M. García partoprenis la programon "*La casa de la palabra*" ("*La hejmo de la parolo*"), gvidata de la ĵurnalisto Roge Blasco en "Radio Eŭskadi". Nia samrondano devis traduki, Esperanto-hispanen kaj reen, la vortojn de

franca esperantisto, kiu mem konstruis specialan biciklon, per kiu trakuris la tutan Francion. Li mem petis paroli Esperante, do la respondeculoj de la radi-stacio kontaktis nian Grupon por fari la traduklaboron.

## BILBAOA BIBLIOTEKO INTERESIĜAS PRI ESPERANTO.

Pere de tiu-ĉi retmesaĝo mi sciigas vin ke la biblioteko de "*Sankta Francisko*" (strato de Bilbao) jam havas la libron "*El hombre que desafió a Babel*" ("*La homo, kiu defiis Babelon*"). Ĝi estis mendita de la biblioteko mem.

*(Santi. Bilbao. 15/12/2009)*

## RAFAELA URUEÑA KAJ LUIS HERNÁNDEZ EN BILBAO.



La 27-an de novembro, niaj amikoj el Valladolid, Rafaela Urueña kaj Luis Hernández, vizitis nian Grupejon. Krom renkonti malnovajn konatulojn, ilia celo estis transdoni al ni diversajn ekzemplerojn de la DVD "Esperanto y traducción. Utopía y realidad", kun la peto ke ni donacu ilin al bibliotekoj de Bilbao.

Tiu DVD, eldonita de Juan Miguel Zarandona, de la Universitato de Valladolid, enhavas la diversajn prelegojn, kiuj konsistigas doktorigan kurson de tiu Universitato, okazinta en Soria.

Sur la foto aperas la geedza paro apud Eduardo Larrouy kaj Teodoro Ibáñez.

## Unu fojon plian la kristnaska lotumo ne trafis nin.


Esperanto-Grupo
Barrencalle Barrena, 7 - 1° - 94 416 44 92 - 696 61 39 58 - 48005 BILBAO
Nacia Loterio № 00001
La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per du eŭroj kaj kvindek centonoj, la numeron 58.937, kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2009.
2,50 eŭroj

Denove ni ne sukcesis atingi monpremion dum la ĉi-jara lotumado de la 22-a de decembro.

Tamen, gravas ke ni sukcesis vendi la tutan loterion rezervita, danke al sindonema helpo de kelkaj el niaj samgrupanoj.

## VENONTAJ E-KONGRESOJ.

09/11 aprilo. 6-a Iberia Renkontiĝo. Almagro (C. Real). www.esperanto.es/joven
02/06 julio. 69-a Hispana Kongreso. Santiago de Compostela.
17/24 julio. Universala Kongreso de UEA. Havano, Kubo.
02/09 oktobro. 18-a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Coma-ruga (Tarragona).

(Kiel ĉiam, pliajn informojn vi trovos en nia Grup-ejo)

**SE VI DEZIRAS RICEVI « NIA PONTO »-n PERE DE RET-MESAĜO,**
skribu al la ret-adreso de la Grupo **esperantobi@gmail.com** por sciigi vian adreson al ni.

Vi ankaŭ ricevos nian revuon pere de normala poŝto, sed iom pli poste.

**H.E.F.**

## NOVA TTT-ejo de KANTABRA E-ASOCIO.

Ni invitas vin viziti la retpaĝojn de KantEA. Ni komencis renovigi ilin okaze de nia 25a datreveno. http://Kantea.ipernity.com

*(Pedro Ullate, Sekretario de KantEA. 06/02/2010)*

## NOVA E-ASOCIO EN ZAMORA.

Ĵus estas kreita nova E-grupo en urbo Zamora, tuj aliĝinta al HEF:

ASOCIACION ZAMORANA DE ESPERANTO
c/ Alcalá Galiano nº13, 4ºdcha.
49021 ZAMORA
Kontakto: Fernando Miguel Lorenzo. Tel. 980512675.
Retpoŝto: nandapu@hotmail.com
TTT-ejo: http://esperantozamora.wordpress.com/

*(El TTT-ejo de HEF)*

Noto: Ni gratulas al Fernando Miguel pro la kreo de tiu nova E-asocio. Li loĝis en Bilbao antaŭ multe da jaroj kaj estis membro de nia E-Grupo, kie li aktive laboris dum iom da tempo. Dum la pasinta HEF-kongreso en Malago, ni havis la okazon paroli kun li kaj rememori pri tiu epoko.



Fernando Miguel dum vizito al nia E-Grupejo en aŭgusto 2009. De maldekstre dekstren, sur la foto, Santi Martín, Fernando Miguel, Teodoro Ibáñez kaj Eduardo Larrouy.

*(Foto kaptita el TTT-ejo de la zamora E-asocio)*

## Hispana E-Muzeo promociita.

Toño menciis la efikon de la novaĵetoj de kataluna TV3 en la municipo kie troviĝas la Muzeo de Esperanto de Sant Pau d'Ordal, kvartalo ene de Subirats.

Joan Inglada ĵus informis en la kataluna forumo pri subita interesiĝo de tiumunicipo, kiu sin esprimis jene:

"*Des del Patronat de Turisme de Subirats properament volem dinamitzar turísticament l'Hispana Esperanto-Muzeo. Així que totes les idees i col.laboracions són benvingudes*"

(“Ĉe la Turisma Patronado de Subirats ni deziras baldaŭ aktivigi turisme la Hispanan Esperanto-Muzeon. Tiel ĉiuj ideoj kaj kunlaboradoj estas bonvenaj”).

*(D. Rodríguez. Madrido. 17/12/2009)*

## Libro pri la hispana E-movado.

La asocio 'Maldekstro kaj Esperanto - SATeH' jxus eldonis la libron 'Crónicas del Movimiento Obrero Esperantista', traduko, kun aldonoj, de la libro de Antonio Marco Botella 'Laboristaj kronikoj'. Vi povas vidi gxian publikan prezentadon per jena ligilo:
http://www.nodo50.org/esperanto/Libroservo/CronicasMovObrero.htm
Vi povas aĉeti ĝin po 8 € skribante al pedrosanzsateh@gmail.com

*(Pedro Sanz. 13/01/2010)*

## Libro de Ferenc Szilágyi en la hispana.




Jen aperis la unua libroforme eldonita beletra traduko el Esperanto al la hispana: “La liberación del juez”, de F. Szilágyi. Informoj pri la traduko aperis en pluraj hispaniaj eldonaĵoj en decembro kaj januaro. La tradukinto, Javier Guerrero, profesia tradukisto el la angla al la hispana, rakontas ke la publikeco estis rezulto de kampanjo, kiun entreprenis la eldonejo. Laŭ li, la traduko de la novelo al la hispana estas nur unua paŝo. "Sendube ekzistas multe da esperantaj verkoj de granda literatura valoro", li konstatas.

Temas pri “*La liberiĝo de la juĝisto”*, unu el la noveloj el la kolekto *La granda aventuro* de Ferenc Szilágyi, unue aperinta en la jaro 1945 en Svedio. La hispana traduko estis eldonita dulingve ĉe la eldonejo Alpha Decay.

La informo pri la traduko estis disvastigita de la novaĵagentejo Europapress, kaj ĝin publikigis diversaj skribaj komunikiloj. La 15-an de decembro aperis intervjuo kun la tradukisto, Javier Guerrero, en *La Vanguardia*, ĉefa ĵurnalo de Barcelono, kaj kelkajn tagojn poste similajn raportojn publikigis la barcelonaj eldonoj de la du ĉefaj ĵurnaloj de Hispanio: *El País* kaj *El Mundo*. Komence de januaro, kune kun fuŝa kaj relative malfavora artikolo pri inventitaj lingvoj, aperis nova informo pri la libro en la madrida ĵurnalo *Público*.

La atento de la gazetaro estis prava, ĉar envere temas pri la unua tiaspeca traduko de Esperanto en la hispanan. Tio povas surprizi multajn legantojn, sed kontrolo en la “*Enciklopedio pri originala literaturo en Esperanto”*, de Geoffrey Sutton, ebligas konstati ke apenaŭ ekzistis ĝis nun versioj de esperantaj beletraĵoj en tiu lingvo.

*(T. del Barrio en “Libera Folio”. 27/01/2010)*

## TRA LA MONDO ...

## “GOOGLE ESPERANTIĜIS.

Nekredeble, sed vidu kiel aspektis la komencpaĝo de la fama serĉilo “Google” la 15-an de decembro, naskiĝtago de la iniciatoro de Esperanto, L.L. Zamenhof. Kaj klikante sur ĝi, estis montrita amaso de retadresoj, kiuj rilatiĝas kun Zamenhof aŭ Esperanto. Multaj neavertitaj esperantistoj ricevis tre agrablan surprizon post gapa rigardado de la E-flago.

## Post la apero de esperanta flago sur 30 titolpaghoj de Google.

Mi rigardis la statistikojn de la retejo de SATeH, kaj la kresko en la nombro da vizitoj estas spektakleca: se en ĝeneralaj tagoj la nombro de vizitoj troviĝas inter po 120 kaj 200, hieraŭ alvenis 4.800 vizitoj, hodiaŭ ankoraŭ pli ol 500. Multaj venas el ligoj informaj pri Zamenhof.

*(T. del Barrio. Madrido. 16/12/2009)*

## lernu.net preskaŭ kolapsis...

Se ankoraŭ iu ne aŭdis, hieraŭ lernu! kaj nia servilo havis malfacilan tempon. Google videbligis Esperanto-flagon en sia logotipo kaj pro tio ni subite ekhavis multege da vizitantoj, kion kompreneble ni ŝatis, sed nia servilo ŝajne ne tre.

Feliĉe la servilo kun granda peno tamen travivis. Nun mi povis pli bone kalkuli ĉiujn ciferojn, hieraŭ mi ne volis aldone pezigi la servilon. Averaĝe lernu! havas ĉiutage ĉirkaŭ 5000 unikajn vizitantojn, hieraŭ ni ekhavis preskaŭ 29000, do 6-oble pli ol kutime.

Esperanto-flago ne plu aperas ĉe Google, sed lernu! daŭre havas sufiĉe multe da vizitantoj. Dank' al Google nun dise en la reto aperis multegaj artikoloj pri la hieraŭa okazaĵo. Multaj ret-gazetoj, blogoj kaj forumoj aperigis informojn pri la reklamaĵo, Esperanto kaj Zamenhof. Kaj pro tio ankaŭ hodiaŭ ni havos pli da vizitantoj ol kutime. Jam nun ni havas ĉ. 6300 unikajn vizitantojn kaj ĝis la noktomezo ankoraŭ multe da tempo. Hodiaŭ ni plejverŝajne ne atingos novan rekordon pri unikaj vizitantoj, sed ŝajne ni ekhavos alian - la plej altan nombron de vizititaj paĝoj tage. Averaĝe vizitantoj ĉe lernu! rigardas ĉ. 90 000 paĝojn ĉiutage, hieraŭ oni vizitis ĉ. 130 000 paĝojn dum la tuta tago. Sed hodiaŭ ni jam havas preskaŭ 150 000 paĝojn kaj, kiel mi jam menciis, ĝis la noktomezo ankoraŭ restas multe da horoj. Do ŝajne uzantoj, kiuj venas hodiaŭ, restas ĉe lernu! dum pli da tempo kaj trarigardas pli da paĝoj ol uzantoj, kiuj venis al lernu! hieraŭ.

Do eble ni hieraŭ havis bonan reklamajxon, kiu alportis al ni grandan nombron de vizitantoj, sed hodiaŭ ni havas pli "bonkvalitan" reklamon, ĉar nin vizitas homoj, kiuj legis pri Esperanto kaj kun intereso poste venas al nia paĝaro. Hieraŭ estis inform-tago kaj hodiaŭ estas tempo por varbado.

*(T. del Barrio. Madrido. 16/12/2009)*

## La patro de “eŭro” estas esperantisto.



Ne multe konata estas la fakto, ke la elpensinto de la vorto “eŭro”, la nomo de la ĉefa monunuo de Eŭropa Unio, estas la belga esperantisto Germain Pirlot, instruisto en mezgrada lernejo en Ostendo.

En sia letero de la 4-a de aŭgusto 1995, Pirlot proponis al la Prezidanto de la Eŭropa Komisiono, Jacques Santer, doni la nomon “euro” (eŭro) al la nova eŭropa mono. En sia leterode la 18-a de septembro 1995, Santer dankis s-ron Pirlot pro tiu sugesto (ref.SG/95/D/86446) kaj la nomo “euro” estis oficiale akceptita en la Eŭropa Ĉefkunveno en decembro 1995 en Madrido.



*(Ĉerpita el revuo “Esperanto”, oficiala organo de UEA. N-ro 1232. Jan 2010)*

## Saluto de la Papo en Esperanto.

Kiel kutime, la Papo salutis hodiaŭ 25 Decembro plurlingve, i.a. en Esperanto.
Fotoj de esperantistoj kun E-afiŝo en Placo Sta. Petro:
http://www.ikue.org/Kristnasko2009/kristnasko2009.htm
La saluto en Esperanto: http://www.ikue.org/Kristnasko2009/bn_kristnasko2009.mp3

*(Darío Rodríguez (Madrido). 25/12/2009)*

## Na’vi.

Lingvemuloj havantaj malmankantan libertempon povas provi tion-ĉi.
**"Na'vi** is a a constructed language spoken by the fictional indigenous race (the Na'vi) on Pandora in James Cameron's 2009 film ***Avatar***. The language was created by Paul Frommer, a professor at USC with a doctorate in linguistics. This website exists to share this beautiful language with all who want to learn."
http://www.learnnavi.org/

*(Raúl Salinas Monteagudo. 04/01/2010)*

## Krei E-familion.

Ĉu vi volas krei esperantan familion, kaj ne scias kun kiu, aŭ ne sukcesas trovi vian "duonoranĝon"? Jen la solvo al viaj problemoj: http://www.edzperanto.org/

(Pedro. 07/01/2010)

## Lingva problemo en diplomatio.

Kelkfoje estiĝas tre grandaj lingvaj problemoj, kiuj afektas diplomatiajn rilatojn:
Sauda Arabio malakceptas nomumon de Akbar Zeb kiel ambasadoro de Pakistano. Lia nomo signifas "kacego". http://u.nu/22ux4

*(T. del Barrio. 05/02/2010)*

## La domajno 'esperanto.com' - elaĉetita por esperantista projekto!

La retadreso "Esperanto.com", kiu longe estis posedata de usona privatulo, estis aĉetita de esperantistoj por nova, nuresperanta socia retejo. La nova retejo estas la dua provo krei esperantistan socian retejon, post 'Amikumu.com', kiu funkciis dum la jaro 2007 kaj tiam atingis proksimume 1.700 membrojn. Ekde julio 2008 la pagxaro de Amikumu.com ne plu funkcias. Kelkajn tagojn post la lanĉo, la nova retejo Esperanto.com jam havas pli ol 250 membrojn.

"Esperanto.com" estas beta-versio de internacia virtuala komunumo de esperantistoj. Esperanto.com estas socia reto, kreita de esperantistoj por esperantistoj. En "Esperanto.com" vi povas komuniki kun amikoj, krei grupojn kaj partopreni en ili, aliĝi al eventoj, verki blogaĵojn, alŝuti fotojn, ludi ludojn, diskuti... - La ligoadreso estas: http://esperanto.com/

*(Miguel G. adúriz. 05/02/2010)*

## Surpriza informo de britaj esperantistoj!

Ok britaj parlamentanoj skribe nomumis Universalan Esperanto-Asocion, UEA-n kandidato por la Pac-premio Nobel en 2010. Inter ili estas parlamentanoj bone konataj en Britujo. Jen iliaj nomoj kaj iliaj partioj:

| | |
|---|---|
| Andrew Smith | Labour |
| Austin Mitchell | Labour |
| Bill Etherington | Labour |
| Oliver Heald | Conservative |
| Charles Kennedy | Liberal Democrat |
| Lord Bob Maclennan | Liberal Democrat |
| Lord Robin Corbett | Labour |
| Roger Gale | Conservative |

Mi ne komentas la informon kaj ne utiligas ĝin por instigi aliajn landajn asociojn agi same efike, ĉar la regularo pri la Pacpremio Nobel (laŭ kelkaj interpretoj) malhelpus tion, sed vi certe povas mem kompreni, ke mi estas kontenta kaj ke mi certas, ke vi komprenas mem, kion vi devas fari.

*(Renato Corsetti. 13/02/2010)*

## Estonta germana ambasadoro, denaska esperantisto.

Pluraj germanaj gazetoj, inter ili Spiegel, raportis ke la nova germana registaro planas sendi la nunan reprezentanton de Germanio ĉe NATO, s-ron Ulrich Brandenburg, al Moskvo kiel novan ambasadoron de Germanio.

Ulrich Brandenburg estas ne nur membro de Germana Esperanto-Asocio, eksprezidanto de Germana Esperanto-Junularo kaj membro de la loka Esperanto-grupo en Münster, sed ankaŭ denaska esperantisto.

*Rudolf Josef Fischer*
*(LA ONDO de Esperanto, 2/184, februaro 2010)*